

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj monatoj ni turnos nian atenton al la vivo, penso kaj verkaro de Hector Hodler, unu el niaj valoraj verkistoj.

La pasintan semajnon ni vidis, ke la gazeto *Esperanto* festis en la numero de la 12-a de julio 1907 la dudekan jubileon de esperanto. El la tri longaj artikoloj de Hector Hodler ni legis al vi specon de folklora poemo titolita **Festa kanto**. Ni hodiaŭ legos al vi erojn el la front-artikolo titolita **Jubileo de Esperanto**.

Cl.- En tiu teksto Hector Hodler unue turnas nian atenton al la graveco de la laboro de niaj unuaj pioniroj, kies plej multaj nomoj estas forgesitaj.

A.- Aŭdu tiun tekston de Hector Hodler :

Cl.- « Antaŭ dudek jaroj aperis malgranda, modesta broŝureto, subskribita de nekonata pseŭdonimo : *Doktoro Esperanto*.

A.- Tiu broŝureto enhavis klarigan enkondukon, dekseksregulan gramatikon, unupaĝan radikaron kaj du versaĵojn.

Cl.- Jen la plena fundamento de la tuta lingvo Esperanto, jen la humila ĝermo, el kiu poste floradis la nuna potenca arbo de Esperantismo.

A.- Kiu fama kritikisto rekomendis tiun libreton kaj laŭtigis la voĉon por aliformigi la konvinkon de siaj samtempuloj ?

Cl.- Kiu eminenta scienca aŭtoritato ekdisputis la demandon kaj bonvolis lumigi la novan elpenson per radietoj de sia fameco ?

A.- Kiu kapitalisto, kompreninte la praktikecon de la nova ilo, elspezis kelke da mono por ebligi ĝian disvastiĝadon ?

Cl.- Kiu progresema regnestro intencis sin ekokupi pri la afero ?

A.- La libreton atentis neniu el la famaj kritikistoj ; la malmultaj kritikistoj, kiuj, pro nesufiĉeco de alia interesa materialo, bonvolis iel ĝin atenti, profetis nepre okazontan fiaskon.

Cl.- La scienculoj penadis en sia laborejo kaj, demandite pri la afero, pretekstis nesciadon kaj konservis singardan neŭtralecon.

A.- La kapitalistoj ja elspezis sian monon, sed dediĉis ĝin al malpli ridindaj entreprenoj.

Cl.- Fine, ne estas bezono paroli pri la progresema regnestroj, kies progresemece iel similas la iradon de limako sur herboplana vojo.

A.- La libreton laŭokaze legadis nur areto da scivoluloj, altiritaj per la noveco kaj ŝajna strangece de la afero, malriĉuloj, humiluloj, nekonatoj inter la nekonatoj.

Cl.- Kij, en la unuaj jaroj, estis Esperantisto, tiun baldaŭ trafis la ridigistoj kaj la publikaj mokistoj ; kaj kio estis tiam la propagando, tion povas rakonti nur la homoj, kiuj, liberigite de antaŭjuĝoj kaj provizite per senlima, kvazaŭ religia, entuziasmo, sin tiam dediĉis al la afero.

A.- Ho ! la unuaj pioniroj ! Eble, la nomoj de la plej fervoraj, de la plej sinceraj kaj memoferemaj, restos eterne forgesitaj ; kelkajn jam prenis la tombo ; aliajn devige forpelis el la batalo la akraj bezonoj de l' vivo ; aliajn senkuraĝigis la tiama senfrukteco de ĉia penado, sed ĝuste en la momento, kiam nia afero estas en esperplena vivado, forgesi nian ŝuldon al

tiuj unuaj sentimaj probatalintoj ni neniel devas, ĉar sen ilia penado kaj malgraŭ la poste veninta kunhelpo de la eminentuloj, kio nun estus Esperanto ? »

Cl.- Poste Hector Hodler faras komparojn inter la stato de Esperanto antaŭ deko da jaroj kaj la stato en 1907. Dum tiuj dek jaroj la lingvo de Zamenhof vere konkeris la mondon, kaj la kongresoj de Bulonjo kaj Ĝenevo alportis certecon pri la praktikeco de esperanto. Al la kritikistoj, kiuj asertis, ke lingvo kreita de sola homo neniam povos vivadi kaj de neniu povos esti uzata, la esperantistoj povas rebate prezenti amason da faktoj, kiuj pravas la plenan viveblecon kaj prosperon de la entrepreno.

A.- Hector Hodler poste rigardas al la estonteco. Li registras multajn mankojn kaj konscias pri la malforto de la movado. Tamen *« flanke de tiuj mallumaj punktoj, la pozitivaj ricevitaj rezultatoj estas sufiĉe belaj kaj brilaj, por ke ni kun brava maltimo kaj plena konfido rigardu la estonton, kiu estas nia. »*

Cl.- Hector Hodler opinias, ke *« la kaŭzojn de tiu sukceso ni devas provi malkovri. »* Jen kion li skribas :

A.- *« La unua kaŭzo estas en la afero mem : Ni defendas solvon de lingvo, kiu staras sur tute certa kaj neŝancelebla fundamento. D-ro Zamenhof eltrovis principojn, sen kiuj, kion ajn oni diros aŭ faros, lingvo internacia ne povas ekzisti. »*

Cl.- Tamen Hector Hodler nenion diras pri tiuj principoj. Legante la tekstojn de tiu epoko, oni ofte trovas similajn asertojn. Ŝajnas, ke la tiamaj esperantistoj sentis, ke esperanto estis la sole neŝancelebla solvo, sed ili ne kapablis analizi la kialojn. Ankoraŭ nun, pli ol sesdek jarojn poste, ni restas je tiu subjektiva argumentado. Ni sentas, ke esperanto estas la sola bona solvo kaj ke ĝi nepre venkos. Sed doni objektivan argumentadon ni ne ankoraŭ kapablas.

A.- Ekster tiu unua kaŭzo de la sukceso de esperanto, kiu estas en la afero mem, Hector Hodler registras aliajn kaŭzojn : la laboron de la esperantistoj ; nian unuecon kaj la submetiĝon al la principo de la netuŝebleco de lingva fundamento ; la komprenon, ke la lingvo riĉiĝos nur per uzado, per tradukado kaj verkado.

Cl.- Hector Hodler opinias, ke la triumfo de esperanto estos efektivigita nur de la esperantistoj mem. Li rimarkas, ke ĉiuj ne ankoraŭ komprenis tion. Ni citas lin :

A.- *« Plene eraras tiuj homoj, kiuj kredas, ke la definitivan venkon ni tenos nur kiam ia komitato aŭ ia regnestro ĝin decidis, ke ĝis tiu tempo, nia laboro estas nur provizora aŭ havas per si mem nenian gravecon. Neniam ia nova ideo estis tiamaniere enkondukita. [...]*

Cl.- *Sankcio de internacia komitato aŭ de regnestro venos nur pli malfrue, kiam nia afero estos praktike elprovita kaj per la uzado jam fariĝos posedaĵo de ĉiuj.*

A.- *Ni ne atendu de la regnestroj aŭ de la patronado de eminentuloj venkon, kiun ili ne povas doni, sed ni mem laboru kaj al la publiko trudu nian aferon, sen la bezono de ordonanta aŭtoritato, kiu neniam povos enkonduki lingvon, se la ĝin uzontaj homoj ne estas preparitaj per longa praktikado kaj la lingvo ellaborita en ĉiuj fakoj. »*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-